

Prof. V. ESPEREMA

ADJUVILO

INTERNACIA HELPLINGVO

*bazita sur la maksimumo da internacieco,
da simpleco kaj de harmonio.*

Sistemo IDO perfektigita

La plej bona internacia lingvo estas tiu
kiu prezentas la plej grandan facilon
por la plej granda nombro da homoj.

Prof. JESPERSEN.

Tiu difino sufiĉas por determini
komplete la solvon de la problemo.

Louis COUTURAT.

Tradukis en Esperanton Roy MCCOY



NOVO
Bajonetstraat 78
3014 ZL Rotterdam
Nederlando
Esperanta eldono 2000

A LA VERAS AMIKOS
DE LA LINGUO INTERNACIONALA

PRECIPUE

A LA MEMBROS DE *Academia pro interlingua*
ed a sua eminenta direktoro.

Prof. G. PEANO

ME DEDICAN TIA LIBRO.

V. E.

ENKONDUKO

La problemo de lingvo internacia estas unu el tiuj kies definitiva solvo pli kaj pli trudas sin ĉiutage.

La ĉiutaga sperto de pluraj miloj da esperantistoj el ĉiuj landoj de la mondo dum la lastaj dudek jaroj (1) estas montrinta la senfinan variecon de la servoj kiujn povus doni al la homaro iu helplingvo lernita de ĉiuj apud la denaska lingvo.

Sed kiel definitive solvi tiun gravan demandon?

Se oni konsideras nur la rezultojn, kaj se oni cedas ke sufiĉas havi iun *BONAN* lingvon, Esperanto solvas ĝin, kaj la obstino de la disĉiploj de d-ro Zamenhof, kiuj ne volas enlasi en sian lingvon nek ŝanĝojn nek reformojn, estas pravigita. Sed ĉu tio sufiĉos por la homaro? Ĉu ĝi kontentiĝos per *BONA LINGVO* internacia, aŭ ĉu ĝi ne volos alpreni *LA PLEJ BONAN*?

Iuj opinias tiel; de tie la pluraj skismoj, kiuj produktiĝis ĉe la partianoj de lingvo internacia.

Unuflanke la amaso da *FUNDAMENTISTOJ*, kiuj konsideras la demandon solvita, gardas kaj propagandas kun entuziasmo kvazaŭ religia la lingvon de Zamenhof, redaktas verkojn, eldonas revuojn, organizas kongresojn; aliflanke la *PERFEKTISTOJ*, kiuj celas doni al la mondo «*LA PLEJ BONAN*» internacian lingvon.

(1) La originala franca eldono aperis en 1910. –*TRAD.*

Tiuj malsamaj sistemoj konsentas pri la principo de *INTERNACIECO* metita en la praktikon por la unua fojo de d-ro Zamenhof (1). Ankaŭ ilia vortaro (aŭ prefere *RADIKARO*) estas, kun malmultaj diferencoj, la sama por ĉiuj, kaj oni povas aktuale konsideri ĉiujn tiujn lingvojn kiel diversajn dialektojn de iu sama lingvo internacia.

Ilia malsameco troviĝas esence en la formoj gramatikaj.

Tre atenta kaj tre senpartia studo de la diversaj sistemoj *PERFEKTISMAJ* estas nin konvinkinta ke *IDO* estas aktuale tiu kies ensemblo plej alproksimiĝas al la plej bona internacia lingvo.

IDO havas kiel aŭtorojn s-rojn de Beaufront kaj Couturat. Ĝi prezentiĝas kiel reformo kaj simpligo de Esperanto.

Ĝi havas super tiu lasta superecojn *PARTAJN* nediskuteblajn.

Sed apud tiuj superecoj ĝi enhavas, rimarkinde en la gramatiko, tre gravajn difektojn kaj komplikaĵojn kiuj estas forigintaj de ĝi multajn reformistojn kaj malhelpinta ĝian disvastigon ekster malgranda rondo de 300 aŭ 400 adeptoj.

Kvankam tiuj difektoj estas ja realaj kaj gravaj, ili tamen estas korekteblaj. Pluraj homoj estas provintaj ĝustigi ilin kaj pluraj proponoj estas jam aperintaj, ĉu kiel kompletaj projektoj ĉu kiel proponaroj,

(1) Tamen la partianoj de la sistemoj *HOMOGENAJ* (kaj inter ili troviĝas tre eminentaj lingvistoj kiel s-roj Peano, Rosenberger, Meysmans, Monseur, Pagliero, Malenaar k.a.) limigas tiun internaciecon nur al radikoj *DE ORIGINO LATINA*.

aperigataj ĉiumonate en *PROGRESO*, organo oficialaj de la lingvo.

Estas multe por preni en tiuj sennombraj proponoj. Sed neniu de la «kompletaj projektoj» povas komplete kontentigi: iliaj aŭtoroj ŝajnas multe malpli okupataj pri forigo de la difektoj de Ido, ol pri arbitra prezento de kelkaj personaj ideoj, inĝeniaj sendube (1), sed neniel konformaj kun la principoj kiuj devus esti iliaj solaj gvidiloj.

Nia maniero agi estis tute alia. Prenante por kriterion de la plej bona lingvo internacia la principon esprimitan de la dana lingvisto Jespersen kaj popularigitan de Couturat, ni estas, gvidate per la sola zorgo doni al la mondo la lingvon la «plej simplan» kaj la «plej facilan por ĉiuj», ellaborintaj *Adjuvilon*.

Adjuvilo ne estas nova lingvo. Ĝi ne estas io alia ol Ido perfektigita, simpligita, senigita je ties difektoj, je ties malregulaĵoj, je ties komplikaĵoj, kaj revestita per nova formo samtempe multe pli simpla kaj pli harmonia. Krom tio ni estas nur aplikintaj *konsekvence*, anstataŭ halti mezvoje, la principojn deklaritajn de la aŭtoroj de *Ido primitiva*. Ni gardis de tiu lasta ĉion kio estis bona, kaj malakceptis nur la formojn difektojn, kiujn ni anstataŭigis per pli bonaj formoj.

(1) Inter la reformoj ni citos: *ILE*, de s-ro Seidel, vic-prezidanto de la grupo idista de Berlino; *DUTALINGUE*, de s-ro Duthil; la Reformon de s-ro Brandt, ktp.... Kun escepto de kelkaj originalaj ideoj, ni ne taksas tiujn projektojn sufiĉe seriozaj.

Estas klare, ekzemple, ke en la vorto *DUTALINGUE* (dua lingvo), s-ro Duthil estas malpli okupata pri enkonduko de sufikso internacia, ol pri dono al la lingvo de nomo kiu rememorigos tiun de la aŭtoro. Jen la priokupiĝoj personaj kiuj havas nenion komunan kun la principoj de la vera lingvo internacia.

Persvadite ke la estonteco rezervita por la lingvo internacia estas vastega, kaj ke ĝi devas ne nur esti utila al tiuj kiuj volas esprimi materiajn bezonojn aŭ servi komercajn interesojn, sed krome doni novan animon al tiuj kiuj pensas, al tiuj kiuj amas, al tiuj kiuj kantas, kaj kiuj volas ke iliaj pensoj, iliaj amoj aŭ iliaj kantoj estu konataj ekster la limoj de iliaj landoj, ni estas strebintaj doni al *Adjuvilo* ĉiom de la beleco, dolĉeco kaj sonoreco kio konvenas al la plej homa el lingvoj.

Laŭ la profunda rimarko de la karmemora d-ro *Javal*, por solvi la helplingvan demandon necesis kunigi la karakterizajn ecojn de la du eŭropaj lingvoj plej disvastiĝintaj en la mondo: la hispana kaj la angla; preni de la unua la nekompareblan belsonecon, la majestan harmonion, kaj al ĝi apliki la gramatikan simplecon de la dua. Ni kredas ke *Adjuvilo* plene respondas al tiu programo.

Ne volante prezenti la kompletan teorion de *Ido simpligita* en tiu ĉi volumo, ni faros tion en estontaj verkoj; unue necesis ke ni pravigu la oportunecon kaj bonegecon de nia reformo, kaj por tion fari montri ke la aktuala formo de *Ido* primitiva tia kia propagandata de la *Uniono di la Amiki*, ne akcepteblas. Ĉiuj sinceraj partianoj de la lingvo «plej bona kaj plej facila pour ĉiuj» komparu do senantaŭjuĝe la du lingvojn, kaj se, kiel ŝajnas al ni nedubeble, la teoria kaj praktika supereco de *Adjuvilo* konvinkos ilin, ili ne hezitu ĝin akcepti. Estus samtempe nepardonebla blindeco, grava eraro kaj peko kontraŭ iliaj principoj mem, konservi obstine formojn kiujn ili scias esti difektaj; kaj ili meritis la riprochon «fetiŝistoj» kiun la ĉefaj idistoj estas multfoje farintaj al la «fideluloj» de Esperanto.

Pli aŭ malpli frue, la formo de *Adjuvilo* trudos sin al Ido, tio estas certa.

Ĉu ne estus pli bone, dum la disvolvo de *Ido* estas apenaŭ komencita, adopti ĝin tuj, kaj eviti tiel poste disiĝojn kiuj estus ĝia ruinigo?

Eblej iuj idistoj riproĉos ke ni turnis nin rekte al la publiko, kaj ne uzis por prezenti nian projekton kelkajn paĝojn larĝe apertajn de *Progreso*, organo dediĉita al la «libera diskuto» kaj tiu «konstanta perfektigo de la lingvo internacia».

Estas ke ni scias tro bone kion signifas tiu «libera diskuto» kaj tiu «konstanta perfektigo». Ni konscias pri la sorto rezervata por sennombraj proponoj de plibonigoj kaj de reformoj prezentitaj de la *idistoj* kaj metitaj en la paĝojn «liberaj» de *Progreso*.

Tiu ŝajna libereco estas nenio alia ol tromp-logilo: senescepte, kiom ajn bone bazitaj estu tiuj diversaj proponoj, mallonga «respondo» traktas ilin kiel neniaĵojn kaj decide asertas ke ne ekzistas, post ĉio, io pli bona ol la aktuala formo de *Ido*, — formo sanktega kaj netuŝebla malgraŭ principoj kaj deklaroj. Ĉu la ĵuro je fideleco trudata de la *Uniono di la Amiki* al ĝiaj membroj ne estas, pri tio ĉi, sufiĉe edifa?

Ni ankaŭ preferis turni nin rekte al la idistoj mem; ni ankoraŭ petas ilin kontroli en tuta sincereco Adjuvilon, kaj kompari senpartie ties gramatikon al tiu de *Ido primitiva*.

Ni ne povas pli bone fini tiun ĉi *Enkondukon* ol per reprodukto de tiuj samaj vortoj kiujn de Beaufront, sub la pseŭdonimo de *Ido*, skribis ĉe la fino de sia broŝuro nomita: *La veraj principoj de la lingvo internacia*.

«Kaj ke oni ne esperu ke la homaro kontentiĝu per la malpli bona, de la malpli simpla, de la malpli kompleta. Tio estus forgesi ke ĝi estas kaj estos pli kaj pli klera pri la demando... La homaro grimacetas pli aŭ malpli longe antaŭ la pli bona, sed ĝi venas al ĝi ĉiam.»

V. ESPEREMA

Parizo, 1 aŭgusto 1910.

ĈAPITRO I

—*—

La fundamenta helplingva principo

*Kiel ĝi estas aplikata
en la sistemo aktuala de Ido*

«La pli bona internacia lingvo, diras prof. Jespersen, estas tiu kiu prezentas la plej grandan facilon por la plej granda nombro da homoj.»

«Tiu difino, aldonas s-ro Couturat, sufiĉas por determini komplete la solvon de la problemoj.»

De tiu kriterio de la «plej bona» internacia lingvo sekvas logike iu kvanto da *principoj* kiuj devos servi kiel *bazo netuŝebla* por la tuta konstruaĵo; — principoj *gvidaj*, — se mi rajtas tiel diri, — kiuj gvidos la kreanton de la lingvo dum ĉiuj liaj esploroj, kaj inspiros lin ĉe la elekto de la formoj plej konvenaj.

Ni studu tiujn principojn, kaj vidu kiel ilia aplikado estas farita en Ido.

Ŝajnas al mi ke la unua devas esti formulita jene:

La internacia lingvo devas esti absolute regula.

Se tiu principo estas tuŝita, kaj se, en unu kazo, aŭ en du specifaj kazoj, oni trovas bonajn kialojn por malobservi ĝin, oni malfermas tutgrande la pordon al arbitreco: Je ĉiu paŝo oni spertos la bezonon aldoni esceptojn, novajn malregulecojn, sub preteksto doni al la lingvo pli da varieco, aŭ pli da riĉeco.

La malregulecoj kaj la esceptoj svarmas en Ido:

a) Malregulecoj en la akcentado;

Laŭ la ĝenerala regulo la akcento devas fali sur la antaŭlastan silabon de ĉiu vorto. *Escepte*, la vortoj finiĝantaj en *ar*, *ir*, *or*, kaj *al*, kaj iuj aliaj, havas la akcenton sur la *lasta* silabo.

b) Malregulecoj en la formado de la pluralo.

La pluralo estas per *e* en la artikolo kiam tiu ĉi troviĝas antaŭ adjektivo kies pluralo povas esti indikata nur per artikolo.

Ĝi estas per *i* en la substantivoj, sed necesas antaŭe malaperigi la *o*-finaĵon karakterizan.

Por la pluralo de la adjektivoj, estas du reguloj:

1° En la ordinaraj kazoj, la adjektivo restas senvaria.

2° En la adjektivoj uzataj kiel substantivoj estas kazoj en kiuj la pluralo formiĝas per aldono de *i* al la finaĵo (*la bonai*), kaj aliaj kazoj en kiuj la pluralo formiĝas kiel ĉe la substantivoj per aldono de *i* al la radiko.

Ĉe la pronomoj relativaj kaj demonstrativaj asimiliĝintaj al adjektivoj, la pluralo formiĝas per anstataŭigo de la fina *i* per *a* (ta, qua, = ti, qui; nia, mia, = nii, mii).

c) Malregulecoj en la uzado de la akuzativo,

kiu ne ekzistas en Ido, diras la idistoj, sed kiun necesas tamen lerni kaj uzi *devige* en kelkaj kazoj. Tio estas,

1° Ĉe la inversioj. 2° Ĉe la pronomoj relativaj komplementaj. Tamen la adjektivoj, al kiuj la pronomoj relativaj estas asimiliĝintaj, neniam prenas la akuzativon.

d) Malregulecoj en la formado de adjektivoj posesivaj,

kie, kontraŭe al la ĝenerala regulo, laŭ kiu sufiĉas

aldoni la finaĵon *a* al la persona pronomo, la triapersonaj posesivoj en la singulara formiĝas per aldono de *sa*. Tiel oni diras: Me-*a*, tu-*a*, ni-*a*, sed il-*sa*, el-*sa*, ol-*sa*.

e) **Malregulecoj en la finaĵoj adjektivaj-pronomaj**, kie per nekomprenbla strangeco, kies logikan klarigon oni vane serĉus, iuj adjektivoj iĝantaj *personaj* gardas la *a*-finaĵon, iuj aliaj prenas la *o*-finaĵon, kaj tria kategorio transformiĝas al *u*!

f) **Malregulecoj en la derivado**, kie la transformo de *adjektivo* al *substantivo* ofte kontraŭas la ĝenerala regulo: Ĉar *bono* laŭ la derivado idista signifas bona homo, *riĉo*, riĉa homo, *santo*, sanktulo ktp, *nulo* devus signifi neniu (homo) kaj ne nenio, *ulo*, kiu ajn homo kaj ne kiu ajn afero, *irgo*, kiu ajn kaj ne kio ajn, *to quo*, tiu kiu kaj ne tio kio.

Troviĝas en tiu malkonsekvenceco pli ol unu parta eraro, pli ol unu malreguleco kaj komplikeco nepravigeblaj; estas *la malvirto de la sistemo de derivado idista mem* kiu riveligiĝas.

La sistemo esperantista, malgraŭ malregulecoj kiujn ni kredas esti korekteblaj, estis, oni devas konsenti, — samtempe pli simpla kaj pli logika. Prenu ekzemple la ideon esprimatan per la adjektivo *bona*. Ni povas konsideri tiun ideon *abstrakte*, en si mem, kaj ni havas, per la simpla anstataŭigo de la substantiva finaĵo al la adjektiva finaĵo, la vorton *bono*. Ni povas konsideri tiun ideon *konkrete* ĉu en iu *afero*, iu *objekto*, kaj ni havas *bon-aĵo* (bona afero), ĉu en iu *persono*, kaj ni havas *bon-ulo* (bona persono). Se nun ni konsideras la *bonan kvaliton* de tiu *persono* aŭ de tiu *objekto*, ni havas *bon-eco* (bona kvalito). Tio estas simple, kaj tio estas kompleta.

Kio povus esti konvinkinta s-ron Couturat malordigi la zamenhofan sistemon de derivado? Li diras al ni ie, ke li tiel faris pro du motivoj; unue pro persona antipatio kontraŭ tiu finaĵo *ulo* kiu *longigas* la vorton je unu silabo, kaj devigas diri *richulo* anstataŭ *richo*, *bonulo* anstataŭ *bono*; — ni povus demandi al li tiam kial li ne faris simile por *aĵo*, kiu estas tutsame longa sen esti, ni kredas, pli eleganta ol *ulo*???

Sed estas alia kialo... S-ro Couturat ne volas la sistemon de Zamenhof, ĉar tiu sistemo *kontraŭas lian opinionojn filozofiajn*. «Malgraŭ Platono kaj ties disĉiploj, li diras, mi rekonas nek la *bonon* en si mem, nek la veron en si mem... Mi ne agnoskas distingon inter la *bona* kaj la *bono*, la *vera* kaj la *vero*, la *bela* kaj la *belo*... Mi ne konas ol *personajn bonajn* ol *aferojn belajn*...» Sekve la *bona* kaj la *bono* esprimiĝas egale en Ido per *boneso*; la *vera* kaj la *vero* per *vereso*. Des pli malbone por tiuj kiuj ne dividas la ideojn filozofiajn de s-ro Couturat! Ili ne eniros en la regnon de *Ido*, kie se ili eniras ili devos decidiĝi legi sur la porto skribaĵon analogan al tiu kiun Danto kredis vidi ĉe la enirejo de la Infero: *Forlasu ĉiun esperon*.

Eĉ se supozu ke s-ro Couturat estas milfoje prava *filozofie*, li estas milfoje malprava *lingve*, ĉar li forprenas de la internacia lingvo rimedon kaj distingaĵon kiuj posedas ĉiuj lingvoj antikvaj kaj modernaj. Li metas sin en la malkapablon esprimi en sia lingvo *siajn proprajn ideojn*, kaj ni defias lin traduki en *Idon* la frazon kiuj ni ĵus pruntis de li.

Tiu ne estas krome la sola riproĉo kiun meritas lia sistemo de derivado, kaj ni revidos en detalo iujn afiksojn de lia lingvo.

* *

La dua principo kiu devenas de la difino de prof. Jespersen estas tiu ĉi:

«**La internacia lingvo devas enhavi neniun senutilan komplikajon.**»

Estas vere strange ke la aŭtoroj de Ido forgesis tiun principon ĝis la punkto de enkonduki en la internacian lingvon formojn kies perfekta senutileco estis elmontrita de dudek jaroj da praktiko, kaj kiuj plie tute ne ekzistas en la plimulto el la modernaj lingvoj.

En ĉiuj tiuj modernaj lingvoj la pasivo formiĝas per la helpo de helpverbo akompanata de la koncerna participo. Oni diras: «être aimé», «to be loved», «estar amado», «geliebt werden». Estas same en Esperanto.

Tiu formo estas multe tro simpla por la filozofia spirito de s-ro Couturat... Li ne aŭdacas tamen forigi ĝin, sed forgesante komplete la grandan leĝon de la evoluo, kiun li reklamas aliloke, li igas nin retroiri je 20 jarcentoj, kaj kredas esti farinta mirindaĵon dotante Idon per *pasiva voĉo plene sinteza*. La logiko, kontraŭe, komplete mankas en tio, kaj oni sin demandas per kiu mirindaĵo *amesos* povas signifi *estos amata*, aŭ *kantesis*, *estis kantata*?

Tio kion ni diras pri la pasiva voĉo, ni devas diri same pri la infinitiva modo.

Ekzistas en Ido por ĉiu verbo *ses formoj infinitivaj*: tri de la aktiva voĉo: *ar*, *ir*, *or*, kaj tri de la pasiva voĉo: *esar*, *esir*, *esor*.

Jen, oni devas rekoni aprezindan kvanton da senutilaj komplikaĵoj en lingvo kies aŭtoroj havas la pretendemon prezenti al la mondo kiel la solvon «la plej simplan kaj la plej facilan de la internacia lingvo».

* *

Al la principoj de *simpleco* kaj de *reguleco* — kiuj devigas sin kiam oni volas realigi la «plej bonan» internacian lingvon, kaj «*la plej facilan por ĉiuj*» — oni devas aldoni alian principon de kiu logiko kaj prudento montras la konvenon, por ne diri la neceson. Oni povas formuli ĝin jene:

La internacia lingvo devos sin prezenti en kondiĉoj de eŭfonio kaj de beleco ellaboritaj ĝis maksimuma eblo.

Inter du lingvoj egale simplaj, egale regulaj, egale internaciaj, sed el kiuj unu kontentigas pli perfekte ol la alia la postulojn de beleco kaj de harmonio laŭ aspekto, ni ne hezitos elekti tiun lastan.

Tiu principo estis, se ne formilita eksplicite de la aŭtoroj de Ido, almenaŭ rekonata implicate de ili kiel necesa.

Tie denove, post ol esti deklarintaj principojn, s-roj Couturat kaj de Beaufront restis mezvoje en ilia praktika apliko.

La nevariebleco de la adjektivo, prezentita kiel principo, *estas kontraŭa* ne nur *al la ĝenio de ĉiuj lingvoj latinidaj*, sed krome al la kutimoj de la granda plimultode la civilizitaj homoj, ĉar estas nur du lingvoj kiuj posedas tion: la angla kaj la hungara; kaj, longe for de korekti tiun apenaŭ kompreneblan kaj nepardoneblan mankon, la itala pluralo per *i* kontrastas kun la finaĵoj *adjektivaj* neŭtraj *kaj nevarieblaj* per *a*, kaj la finaĵoj anglo-saksaj per *al* (akcentataj) igas ĝin eĉ pli ŝoka (1). Estas anomalio des pli nepardonebla

(1) «*Sekreta sento de harmonio,*» por uzi la esprimon de s-ro Couturat, igas nin trovi komplete malŝatinda tiun ligan de *a* singulara al *i* plurala. Ekzemple: *bela flori*, *multa homi*, aŭ plie *varm jorni*, *floroz voyi*, ktp.

tio ke, de la vidpunkto de la *facileco*, la nevariebleco de la adjektivo estas *trompo*: Mi diras trompo, kaj ĝi meritas duoble tiun kvalifikon, ĉar tamen necesas en iuj kazoj doni pluralon al la adjektivo, kaj estas multe pli malfacile parkerigi esceptojn ol unu ĝeneralan regulon.

*
* *

La internacia helplingvo devos konsisti el elementoj kombinantaj la plejan internaciecon eblan, cele al esti komprenebla per la minimuma strebado al la plej granda nombro da homoj.

Ni ne restos longe ĉe la *principo de internacieco* ankaŭ entenita en la difino de prof. Jespersen. Se ni ne faros tion, ne estas ĉar ni rifuzas atribui ĉiom de la graveco kiun ĝi meritas al tiu principo *fundamenta* kaj nepra de internacia lingvo: estas ĉar ni juĝas ke ĝi estas sufiĉe atestita de *Ido*, kiu en la *Veraj principoj de la lingvo internacia* dediĉis al ĝi lokon preskaŭ eksklusivan; ankaŭ estas en la *Vortaro* ke troviĝas malplej da malperfektaĵoj.

Estas iuj tamen!

Ni ne povus, ekzemple, toleri *ucel* por birdo, kiu estas pure itala, dum la radiko *avi* atingas ĉiujn latinid-lingvanojn; poste la anglalingvanojn per la vorto *aviary*, kaj la tutan mondon per la internaci-iginta vorto *aviation*, ktp.

La profunda studado de la Ido-vortaro malkovras al ni amason da aliaj eraroj ĉe la elekto de la aliaj radikoj, kaj, kio estas pli malbona, *la maleston de ia ajn metodo*, kaj la *evidenta malobservo de la programo* kiun *Ido* estis skizinta en la broŝuro citita supre.

Kelkaj samkategoriaj vortoj, kiujn ni nomas *paralelaj* ĉar ili havas en ĉiuj lingvoj de kiuj ili estas pruntitaj originon, formon kaj uzon iel *paralelaj*, ĉesas esti tiaj sen kredebla kaŭzo. Kial la formo *diplomaco* (kaj ne *diplomatío*) flanke de *demokratio*? Kial *skrib-ar* (kaj ne *skript-ar*) flanke de *lekt-ar* — kaj kvanto da malkonsekvencaĵoj de la sama tipo? En la plimulto de la kazoj, oni faris tion kun la videbla intenco eviti konfuziĝojn: sed tiu timo mem ne estis ĉiam pravigita.

Sed la difekto plej grava estas en la *ortografia* formo kiun Ido estas doninta al siaj vortoj.

En la *Veraj principoj de la lingvo internacia* Ido skribis en dikaj literoj: «**La grafismo unue, la fonetismo poste!**» Kaj li pravis, pro du kialoj: 1° ĉar 90 fojojn el 100 la internacia lingvo estos skribata, kaj ne parolata; 2° ĉar malakceptante, pro kialoj de *praktikeco*, la supersignitajn literojn kiuj permesis akordigi la grafismon kun la fonetismo, li estis devigita elekti inter unu kaj la alia: li elektis la unuan, kaj per malkonsekvenco evidenta, li metis ĝin en la duan rangon: estas tiel ke li kripligas ĉiujn vortojn kun *kc* aŭ *sc*; kaj skribas *acceptar* por *akceptar*, *suceso* por *sukceso*, *instinto* por *instinkto*, *ceno* por *sceno*, *cienco* por *scienco*, ktp... Per priakcenta skrupulo puŝita preter ĝustaj limoj, li *malbeligas* la tutan kategorion de vortoj kun *io*, kaj skribas *familyo*, *filyo*, *historyo*, *Eklezyo*, *religyo*, *radyo*, ktp... anstataŭ konservi la grafismon internacian *familio*, *historio*, *religio*, *radio* ktp...

Ni plu diru ke la pluralo de tiuj vortoj: *historyi*, *religyi*, aldonas ankoraŭ pli al ilia malbeleco, kaj igas ilin krome malfacile prononceblaj.

* *

La internacieco devas regi ne nur ĉe la vortaro, sed ankaŭ, tiom kiom eble, ĉe la formoj gramatikaj. Kaj necesos zorge bone ke tiu *internacieco gramatika*, se oni povas tiel nomi ĝin, difektu nek la simplecon, nek la regulecon *netuŝeblajn* de la internacia lingvo.

Ido enkondukis, kontraŭ ĉiuj reguloj de internacieco, vortojn aŭ formojn gramatikajn, kiujn tiom da aliaj havus multe pli da kialoj por anstataŭigi. De kie venas *kad* por diri *ĉu*? kaj *ol* kiel neŭtra persona pronomo de la 3^o persono?

Kial esti elektinta *ar* por indikilo de la infinitivo, kaj *ez* kiel finaĵon de la subjunktivo imperativa?

Volante flati la hispanojn kaj la francojn, tiuj du finaĵoj profunde ŝokas ilin. Se la hispano aprobas kiam li vidas la verbon *amar*, se la franco komprenas kiam oni diras al li *venez*, ili ne povas reciproke malebligi al si trovi groteske, ke *venir* tradukiĝas per *venar*, *dormir* kaj *courir* per *dormar* kaj *kurar*, kaj ke *li irez* signifas: ke *ili iru*.

Ni aldonu ke tiuj arbitraj finaĵoj venigas al la gramatiko ĉiun specon de zorgoj. La finaĵoj per *ar*, kiuj estas absolute damnitaj de la *evoluo*, devigas enkondukon de esceptoj en la akcentado de la vortoj, kaj ili krome ne povas esti konvene prononcataj de la angloj. Koncerne la finaĵon *ez neakcentata*, ĝi ne estas sufiĉe sonora por dece ludi la rolon de imperativo.

* *

Ni ne povas eksponi tie ĉi ĉiujn el la difektoj de *Ido*. Sed necesis substreki la plej frapajn makulojn de ĝia gramatiko kaj de ĝia vortaro.

Tiuj makuloj forprenas nenion, cetere, de ĝiaj bonaj kvalitoj. Kaj nia sola linio de konduto estos tiu ĉi: malaperigi la unuajn kaj konservi la duajn, dume aldonante al tiuj novajn.

ĈAPITRO II

—*—

La fundamenta helplingva principo

*Kiel ĝi estas aplikata
en Ido simpligita aŭ Adjuvilo*

1. — La reformo devos konsisti esence kaj antaŭ ĉio el la jenaj eroj:

Reguligo de la akcentado de la vortoj;

Reguligo kaj simpligo de la regulo por formado de la pluralo ĉe la artikolo, la adjektivoj, la substantivoj, la pronomoj;

Kompleta forigo de la akuzativo;

Simpligo de la konjugacio per la forigo de la pasiva voĉo sindeza kaj de la kvin superflujaj infinitivoj;

Simpligo de la formado de la posesivaj adjektivoj, kaj forigo de la malregulaj formoj;

Reguligo de la derivado, kaj unuigo de la finaĵoj adjektivaj-pronomaj.

Plibonigo de *la ĝenerala aspekto* de la lingvo, al kiu oni donos karakteron pli naturan, same kiel plian belsonecon.

Serioza revizio de la afiksoj kaj de la vortaro: forigo de pluraj difektoj de detalo kaj anstataŭigoj per pli bonaj formoj de formoj malbonaj aŭ nesufiĉe internaciaj.

2. — La Esperanta pluralo en *j*, kiun la plimulto de la reformistoj trovas nesufiĉe harmonia (1), havas

(1) Prononcata *kiel ĝi devas esti*, la *j*-finaĵo estas neniel malharmonia. Sed la principo de internacieco devigas nin preferi la finaĵon *s*.

tamen super la pluralo de Ido primitiva tre grandan avantaĝon: Ĝi estas pli simpla, kaj aldoniĝas sen iu ajn malfacilo al la finaĵo de substantivoj, adjektivoj, kaj pronomoj relativaj, ĉiam respektante same la normalan akcentadon kiel la karakterizan finaĵon. Tiuj du punktoj estas aparte gravaj.

Necesos tial reveni al la antaŭa formo de la pluralo, aŭ adopti alian kiu estu simile aŭ eĉ pli bona.

La finaĵo *s*, kiu estas uzata kiel indikilo de la pluralo fare de pli ol 350 milionoj da personoj, aperas tuj kiel la solvo ĉiel la plej kontentiga. Ĝi aldoniĝas kun ekstrema facileco al ĉiuj vortoj kapablaj preni la indikilon de la pluralo. Per ĝi la lingvo gajnos forton, harmonion kaj sonorecon: ĝi surmetos tiun elegantecon de natura *novlatineco* postulata de sia vortaro, novlatineco de kiu la kastilia lingvo ŝajnas al ni kiel la reenkarriĝo plej pura.

Tiu elegantecon mankas al Ido primitiva; ĝi donas al tiuj kiuj volus ĝin paroli la impreson de lingvo nefinita.

La sonoreco gajnota de la lingvo Ido per tiu nova formo de la pluralo pliigos ĝian kompreneblon. Kun malpli da peno la oratoro ĉe la estontaj internaciaj kongresoj igos sin komprenata de ĉiuj; kun pli da dolĉeco kaj samtempe da forto la internacia lingvo esprimos en la literaturo kaj en la poezio (1) niajn sentojn kaj niajn impresojn.

(1) Al tiuj kiuj timus, de la vidpunkto de eŭfonio, la oftecon de la litero *s*, ni rememorigos ke la hispana, unu el la plej harmoniaj lingvoj se ne la plej harmonia el ĉiuj, enhavas 12% pli da ĝi ol *Adjuvilo*. Ĉu iu iam riproĉis la hispanan pro tio?

Krome, oni povus eviti sen iu ajn malkonveno la uzon de la pluralo en la *artikolo* kaj la *participoj*, kie ne ekzistas la sama neceso kiel en la aliaj kazoj. Ekzemple: *Nos estin rigardanta la kampos* anstataŭ: *Nos estin rigardantas las kampos*.

3. — Evidente ni devos doni al la konjugacio novan finaĵon. Sed ni havos nenion por perdi pro la ŝanĝo: La finaĵo *s* estas arbitra. La finaĵo *n* ne estas tia, kaj, je rimarkinda koincido, troviĝas en la konjugacioj de multaj lingvoj apartenantaj al familioj plej diversaj. Ni alprenos ĝin, kaj ni havos nenion por bedaŭri dirante: *las avios kantan sur las arboros de nosa jardeno* (1), anstataŭ: *la uceli kantas sur la arbori di nia gardeno*.

4. — Kompreneble por nenio en la mondo ni konservos la aĉan *ez*, por indiki la subjunktivon-imperativon; la finaĵo *en* ŝajnas tro trafa, kaj ankaŭ tie, dirante «*Propagen* vos Adjuvilo» ni estos tuj komprenata de la germanoj, kiuj diros: «*Verbreiten* Sie Adjuvilo!», kaj de la hispanoj, kiuj diras: «*Propagen* Vds Adjuvilo!»

5. — La **infinitivo en *i***, komuna krome al ses aŭ sep lingvoj, havas nenombreblajn avantaĝojn: ĝi lasas al la radiko ties normalan akcenton, ĝi asignas al la verbo simplan karakterizilon, senpere korespondan al la finaĵoj *o*, *a*, *e* de la substantivo, de la adjektivo kaj de la adverbo.

Ĝi povas krome esti aldonata *sen misformi* la latinajn radikojn *kiu ajn estu la konjugacion* (*dormi*, *veni*) same kiel la ĝermanajn radikojn, kiuj ĝemus vidi sin vestaĉitaj de Ido per malartisma *ar* (ekzemple *lernar*, *drinkar*, same ofendaj kiel *dormar* kaj *venar*).

6. — koncerne la **akuzativon**, estas bedaŭrinde ke Ido primitiva faras nenion ol kompliki ties uzadon, kiam estus sufiĉe facile radikale forigi ĝin.

(1) En la hispana: *los pájaros cantan sobre los árboles de nuestro jardín*.

Estas unu kazo, ili diras, kie la akuzativo estas utila, kaj unu kazo kie ĝi estas necesa. Ĝi estas utila en la inversioj. — Sed la hispana kaj la itala ne posedas ĝin kaj tamen havas inversiojn! Oni simple evitos la inversiojn kiuj estus dubsencaj; oni povos traduki: Mi aĉetis librojn, per: *Libros me komprin*; sed oni ne faros inversion en frazoj de tiu ĉi speco: *Petro batis s-ron X...* ĉar estus dubsence. Estus nur unu kazo en kiu la akuzativo estu necesa, tio estas en la uzado de la relativa komplemento. Laŭ la ekzemplo de la angla, la hispana kaj ĉiuj lingvoj novlatinaj, ni havos *pronomon komplementan* kun nevariebla formo. Apud *qua* (kiu) kaj *quo* (kio) ni havos *que* (kiun, kion), kiu prezentas sin al ni kiel la plej internacia.

Le monsieur que vous avez vu ici possède ces champs que nous avons admirés pendant notre voyage: La siro que vu vidin hike, posedan las agros, que nos admirin dum nosa vojajo.

